

# BULTENO

## DE ESPERANTISTA KLUBO

### EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 3/1988

julio 1988

La Praga saluto al la 11-a Ĝenerala MEM-Konferenco,  
kiu okazis fine de aprilo en Budapeŝto

Estimataj gesamideanoj,  
mi havas la honoron saluti la 11-an Ĝeneralan Konferencon de MEM en la tute de la Esperantista Klubo en Prago, Ĉeĥoslovakio.

Ni kunvenas en ĝoja etoso, ĉar kun grandaj simpatioj kaj esperoj ni atendas la venontmonatan pintrenkontiĝon de ŝtatestroj de Sovet-Unio kaj Usono en Moskvo. Ni konscias pri tio, ke tiu ĉi renkontiĝo okazos dank' al granda kaj persista laboro de pacaj fortoj en la tuta mondo. Ni esperantistoj estas parto de tiuj ĉi pacaj fortoj kaj ni bone scias, ke ankoraŭ granda kaj longdaŭra laboro atendas nin.

Ni, Pragaj esperantistoj, laboras per ĉiuj niaj fortoj por disvastigi la pac-ideojn kaj ideojn de Esperanto inter neesperantista publiko. Reprezentanto de nia klubo estas membro de la urba Pac-konsilantaro, ni havas kontaktojn aŭ vigle kunlaboras kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj, kun naturprotektantoj, turistoj kaj Ruĝa Kruco, ni jam multfoje forsendis malnovajn okulvitrojn en la Agado E3.

Pasintjare ni aranĝis publikan koncerton, en kiu oper-kantistoj de Nacia Teatro en Prago prezentis kantojn kaj ariojn en Esperanto, ni havis du ekspoziciojn de pentraĵoj, fotografiaĵoj kaj manlaboraĵoj, en kiuj centoj da vizitantoj eksciis ankaŭ pri Esperanto kaj pri nia pac-laboro, en parko proksime al nia kunvenejo ni solene plantis memor-arbon honore al la Centjariĝo de Esperanto kaj 85-jariĝo de nia klubo kaj ĉi-jare al la arbo estos instalita memorŝtono. Por la nuna jaro ni preparas novajn ekspoziciojn, turisman konkurson kaj precipe novan specon de kvaronjaraj nacilingvaj publikaj kunvenoj de nia Esperantista Klubo, en kiuj ni volas pliproksimigi al la neesperantista publiko, paroli al ĝi, interesigi ĝin pri niaj aktivecoj kaj varbi ĝin por nia movado. La unua tia kunveno okazos jaŭde la 12-an de majo.

Estimataj amikoj, mi deziras multajn sukcesojn al nia komuna laboro!

Ĉestmít Vidman

En majo

Maje la kor' plej forte frapas  
kiel flago flirtas alten  
en la arbonestoj vivas  
ĉie ŝosas ĝermas kreskas poezio

Ĉi minute ses litroj da sango  
ĉiuhore tricent sesdek litroj  
dum sepdek majoj tri miliardoj da pulsobatoj  
senripoze kaj senpaŭze kaj senhalte

Kiom da sento povas enteni  
tiu triono de kilogramo  
duono de procento el pezo  
de unu "homo sapiens"

Kion ni scias pri tiu kava muskolo?  
Ke ĝi ekvivas en la okdeka tago  
kaj batas daŭre dum homa vivo  
kiel la plej klepodanta forĝisto

Homoj duope sin apogante  
manon en mano kun unu pulsado  
ascendas la vojon  
supren al suno

En majo la koro plej forte frapas  
samkiel flago ekflirtas en vento  
en nestoj sur arboj ĝi vivas  
Ĉu vi perceptas tiun pulsfrapon de la printempa poezio?

Tiun ĉi poemon prezentis Eva Seemannová la 23-an de majo 1988 en la programo "Esperanto-poetoj en majo" en la klubejo Kodaňská.

Karel Outrata

Cizelisto de arĝento

Plifrostis  
kaj briloj de prujno  
serĉas sian lokon  
sur branĉoj  
bariloj  
kaj malnova krado

Frosto  
la eterna gildomajstro  
de ĉiuj juvelistoj  
okulumas de sur firmamento  
kiu el virinoj  
scias la antikvan arton  
majesti per malnova arĝento

Al tiuj poste  
li en harlanugo  
elsorĉadas diademon

Tradukis Štruncová

Jana Cíhová

Pomarbo kaj Betulo

Tuŝapude  
la Betul'  
blankpieda, verdfolia.

Hararanĝo -  
foliaro -  
terenfalas al piedoj.

Piedeto  
bela, blanka  
pelas Ĝin en maltrankvilon.

Kaj la tristo?  
Malaperis!  
La-Betulo dancas arde.

Ĝiaj haroj,  
tute verdaj,  
movinstigas min kun vento.

Piedeto  
Ĝia blanka  
ĉirkaŭrodas min ĉiame.

Jam mi scias!  
Ĝia danco  
igis min ja kune danci.

Mi tremetas -  
kune l' Tero -  
dancas ĉio ĉirkaŭanta.

Ĉarme estas!  
Estas ĉarme  
kiel estis ja neniam!

Mi ja floras,  
por Ĝi floras,  
Ĝi nur grandan ĝojon havu!

Sun' aperis!  
Sun' ekbrilis!  
Ĉio en la kamp' klariĝis.

La Betulo  
kaj Pomarbo  
en brakum' la branĉojn plektis.

Kia ŝanĝo!  
Mirmiraklo!  
Mi kaj Vi nin ĉirkaŭbrakis!

(El poemkolekto  
"Kvar sezonoj")

Eli Urbanová

Doloro

Doloro tuj post la vekigo;  
doloro kaj mi en negliĝo;  
doloro, kiam mi aranĝas  
la drapiraĵojn ruĝ-oranĝajn;  
ĝi ĉiam sama, ne pli milda;  
dolor' dum pluv', dum trilo birda;

doloro, kiam mi min lavas:  
ĉe tablo ĝi la lokon havas,  
kiam mi nigran kafon trinkas;  
doloro, kiam mi min ŝminkas;  
kiam mi al mi ŝuojn ciras;  
tiel nur ombro kun ni iras;

doloro, kion ajn mi faras,  
kruela, eksterordinara,  
nepre plej granda sub la suno;  
doloro, damno, dia puno;  
la reĝolandon por pulvoro  
helponta kontraŭ ĉi doloro!

Doloro, peza am-imposto;  
kaj mi aspektos haŭt' kaj ostoj;  
mi, iam in'; nun bedaŭrinda,  
pro ofta ploro duonblinda;  
kaj mi ankoraŭ kaj plu pagos,  
pagos por ĉiu bela tago,

pagos per larmoj kaj per ĝemoj,  
sed ĉefe, ĉefe per poemoj;  
kaj pagos mi per amfibrakoj  
por ĉiuj kisoj, ĉirkaŭbrakoj  
kaj pagos ankaŭ per troke';  
doloro meze de la kreo;

doloro, ci tirano, vi, vi -  
vi, kiun devis mi travivi;  
vi, jam du jarojn doloranta;  
vi, evidente jam konstanta;  
vi, tolerata sen protesto;  
kaj estas via nom' Ernesto.

(Dua premio en Trieste, 1984)  
(El poemaro "Verso kaj lamo")

Mi estas urba hundo. Mi loĝas kun mia mastro en la kvina etaĝo de ludomo, kaj krom miaj zorgoj kaj ĝojoj mi partoprenas ankaŭ la liajn. Li multe instruis min kaj tiel post kvin jaroj de vivo en nia kunhejmo mi povas deklari, ke mi estas konatulo de homoj, kaj mi scias kiamaniere konduti al ili.

Antaŭ ĉio mi povas diri, ke la homon mi determinas laŭ tio, kiamaniere li eksonoras. Ekzemple, se la sonorilo sonoras unufoje, mi bojas. Estas tio averte por asekuristoj, enkasigistoj, ne bonvenigataj gastoj kaj pluaj ne dezirataj unuopuloj. La tintado dufoje lasas min sen ekscitiĝo. Tio estas homoj, pri kiuj oni scias, ke ili venos. La tintado trifoje signifas ekstari, ĝoje turni voston kaj ĉirkaŭflati. Venis nome - memkompreneble unuope - junulinoj de mia ĉefo, kiun ili nomas Roberto, Robo, Robulko (kvankam li nomiĝas Pepo). Ekkrios "Vidu, tio estas bela hundeto," esperigas mian mastron, ke malpli frue ili diros tion saman ĉe vineto ankaŭ al li.

Sed unufoje longe kaj trifoje mallonge, tio estas por mi ordono por terura ripetpafa bojado, hurlado kaj averta grumblado. Mi estas konvinkita, ke antaŭ la pordo staras la eksedzino de mia mastro kaj venas fari scenon, ĉar li ne pagas aŭ kotizojn, kiujn atribuis al ŝi tribunalo, aŭ ne plenumas pluajn devojn de pasintaj jaroj. Por tiu ĉi virino mi estas monstro-bestaĉo kaj bastardigita hund-hieno, mi - luphundo kun elita genealogio... Ŝi havas feliĉon, furiozulino, ke la pordo antaŭ ŝi neniam malfermiĝos, alie ŝi ekkonus, kiom da dentoj mi havas.

Foje kuŝante en la korbo trapelante rememorojn en mia hunda kapo, mi aŭdas la sonorigadon ĉe ni ĝis nun neuzatan: unufoje longe, dufoje longe kaj poste nur "cvrnk". Mi pelas al la pordo, kaj pro certeco mi komencas boji, sed jam estas ĉi tie mia mastroĉjo vestita en negliĝan veston, agrable odorita, donas al mi amikan kapofrapon: "Silentu, Rolfiko, ĉu tion oni faras?"

Mi okulegas al tiu nekutima vizitantino. Hm, vere bela "homa peceto" kaj malantaŭ ŝi - ĉe hunda kruro - hundino de mia raso. La lipharojn bele lekitajn kaj koketa en koksoj. "Venu, Dolly," diris la belulino, "la hundeto estas bona, vi amuziĝos kune" kaj ili ekspedis nin kuirejon. Diable, ankaŭ li povis ion diri, malbenita ĉefo, mi havas eĉ ne trakombitan hararon.

Dolly estis perfekta. Momenton ni rakontis, dumtempe mia mastro montris al tiu damo novajn gramofondiskojn.

Post certa tempo venis Roberto hejmen, terure insultis, frapis per ĉio, kion li havis ĉe mano, treneniigis mian korbeton, kaj poste li malfeliĉe deklaris, ke tiu renkontiĝo ne restis sen sekvoj. Rigardante lin humile mi volis helpi al li iamaniere. Li silentis kaj post momento gratis min malantaŭ oreloj kaj ekflustris: "Ne rigardu, ne rigardu, ci estas "en tio" ankaŭ. Ci havas ilin kvin, sed pro tio ĉiuj havas ĝojon...."

Li kaŝis la kapon en manplatojn kaj iel niamaniere ekhurlis: "Damna hunda vivo."

De tiu tempo ĉe ni la sonorileto iel ne funkcias.....

trad. Ves.

Pavel Landa

### Bulko

"Ĉu vi estus tiel senlime afabla kaj la bulkon al mi enpakus?" petegis olduleto kun vizaĝo ĉifonita tiom, ke li aspektis kiel propra karikaturito. "Ne estas papero", konigis vendistino tiagrade klare, ke ĉiu, sen interpretisto komprenu: lasu min trankvila, fiulo. "Jes, jes, certe, kompreneble" murmuretis la ĉifonita elfositulo, "sed tiukaze bonvolu ne koleri, mi permesus al mi, kiel eble plej ĝentile, vin peti pri la libro de deziroj kaj mallaŭdoj". La resta starvico pli atentis. La diino malantaŭ vendotablo ĝuste reviviĝis. "Ja, certe jes, nur ĝi tien trankvile ĉion enskribu", evidente ŝi bone amuziĝis, "estimata sinjoro, ni ne havas paperon jam tri semajnojn!" Kaj ĵetadis antaŭ la olduleton la konatan kajeron kun zorgeme kaj precize numeritaj paĝoj. Oldulo dankis. Li transturnis la folion kun kopio pri la lasta laŭdo, la sekvajn du foliojn atenteme elŝiris, la bulkon volvis en ilin kaj dirante: mian estimon, riverencon - li foriris.

Elĉeĥigis H. Štruncová

UEA kredas je anĝeloj!!!

Ne nur, ĝi alvokas ilin. Ĉar alimaniere mi tute ne povus klarigi al mi anoncon, lanĉitan de USA kun jena teksto:

"UEA serĉas organizanton-administranton por siaj Universalaj Kongresoj. KONSTANTA KONGRESA SEKRETARIO

FUNKCIOJ: Inkiuzivas buĝetadon kaj librotendon, redaktadon de kongresaj eldonaĵoj, laborkunordigadon. KKS kunlaboras kun. LKK kaj respondecas pri kongresa politiko al Estraro de UEA.

KVALIFIKOJ: Studoj pri ekonomio, sociologio aŭ manaĝeraj sciencoj estas bonvenaj. Necesas flua bonnivela rego de Esperanto, kono de aliaj lingvoj estas tre dezirinda. Kandidato devas posedi kelkjaran sperton kiel aktiva esperantisto, organizan kaj mastruman talenton, kapablon kunordigi grupan laboron, agrablan kaj firman karakteron, facilon kontakti homojn kaj harmonie kunlabori kun ili, entuziasmon kaj iniciatemon. La posteno aparte taŭgas por persono inter 25 kaj 35 jaroj, prefere ne edz(in)iĝinta..."

Tiom revuo Esperanto n-ro 1/1988.

Kaj mi vokas: Se tia anoncos sin, bonvolu prezenti lin (ŝin) al mi, mi ege ŝatus vidi similan esperantist(in)on antaŭ mia morto!!! Des pli, ke nenie mi trovis mencion pri salajro. (Pri megalomaniuloj mi ne interesiĝas.)

H. Ŝ.

-----  
En julio, aŭgusto kaj septembro ĉi-jara gravan vivo-jubileon atingos jenaj membroj de nia klubo: prom. fil. Lubomír J a k l , Anna K u b o v á , Ludmila B a r o c h o v á , Stanislav L e ŝ i n g e r , Ludvík K l i m e ŝ , Miroslav Ŝ a f r á n e k , Marie Ŝ v e h l o v á , Sonja Z e d n í k o v á , Karel Z a h r a d n í k , František B r a n d e j s , Milada J o s k o v á , Dr. Jan R a t h a y , Franciska W e l t e r o v á kaj O t a J e r i e . Al ĉiuj ni sincere kaj plenkore gratulas!

-----  
Membro de nia klubo, populara teatra kaj filma aktoro Ota Sklenčka, estis la 1-an de majo nomumita nacia artisto. Ankoraŭfoje ni gratulas.

-----  
Okaze de "Internacia Tago de Mondpaco" je 1-a de septembro 1988 aranĝos la Esp.-grupo Dessau letervesperon kaj ekspozicion!

Ni atendas salutleterojn, E-aĵojn, desegnaĵojn ktp. por demonstri la disvastigon de Esperanto. Ĉiu sendanto ricevos respondon.

Ni bezonas ankaŭ vian salutkarton! Skribu al: s-ro Uwe Heidrich, Augustenstr. 8, DDR-4500 Dessau, GDR

-----  
LA UNUA PUBLIKA KUNVENO DE NIA KLUBO okazis jaŭde la 32-an de majo en la granda salono de la Agitacia centro en Kodaňská strato. Kunvenis kelkdekoj da esperantistoj kaj ankaŭ neesperantistoj, invititaj per grandaj afiŝoj. Male al niaj ĉiulundaj kunvenoj ĉi-foje la tuta programo estis ĉeĥlingva, por ke la ĉeestantaj neklubanoj bone komprenu. Ĉiujn bonvenigis s-anino H. Ŝtruncová, kiu havis mallongan paroladon pri Esperanto kaj pri la aktivecoj de niaj klubanoj. Poste sekvis teatra prezentado, kiun plenumis dramartistino s-anino Eva Seemannová. Speciale por ŝi, honore al ŝia laborjubilao, poeto Ĉestmír Vidman verkis teatraĵon "Kvindek jarojn sub la masko". La aktorino revenis en sian junaĝon, kiam ŝi unuafoje staris sur la scenejo, kaj popaŝe prezentis, al ni la plej ŝatatajn rolojn de la monda kaj ĉeĥa repertuaro, kiujn ŝi iam ludis. Ne mankis mencioj pri Esperanto kaj rememoro pri la iama Verda Ĉaro. La prezentado elvokis senfinajn ovaciojn de la ĉeestantoj al la aktorino kaj ankaŭ al la ĉeestanta aŭtoro. La vespero estas tre sukcesa kaj la kluba komitato jam preparas programon de plua publika kunveno.

-----  
BULTENO de Esperantista Klubo en Praha, baza organizaĵo de ĈEA. p. k. .1069,  
111 21 Praha 1. Redaktas: La komitato de la Klubo.